



**Direktoro P-o Em. PELTIER**  
**Sainte-Radegonde ; Tours (Indre-et-Loire) France**  
**Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K. estu sendataj nur**  
**al la Direktoro. Manuskriptoj neniam estos resendataj.**

**ABONEJOJ de E. K.**

- FRANCLANDO : Ĉe la Direktoro de E. K., kaj ĉe la Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris V<sup>e</sup>.
- ANGLOLANDO : S-o O'Connor, 17, St-Stephen's Square, Bayswater, LONDON.
- BELGLANDO S-o P. Mattelaer, 3, Place de l'Université, LOUVAIN.
- BOHEMUJO-AŬSTRIO: F. Topič, libr. Ferdinandova 9. Praha.
- ĈILILANDO S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679. SANTIAGO-CHILI.
- HUNGARLANDO S-o Endre Varjufalvy Varju, IV, Kigyo, U. 6, 2. em. 14, BUDAPESTO. —
- ITALLANDO: S-o J. Meazzini, presso Franco Lucani, piazza G. Monaco 18, AREZZO.
- HISPANLANDO S-o Ant Guinart, Escuelas Pias. VALENCIA.
- GERMANLANDO Moller et Borel, 95, Prinzenstr. Berlin.
- POLUJO Arct. libr. Nowry Swriat, 53, Warszawa.
- RUSLANDO Societo Espero, Bol. Podjačeskaja, 24, log. 12. S. Peterburgo.

**Ciuj verkistoj estas persone respondaj pri siaj artikoloj. La Revuo estas responsa nur pri artikoloj subskribitaj de la Direktoro.**

PRESEJO A. BARBOT  
 15. Rue Etienne-Pallu, 15  
 TOURS. (TUR') FRANCE

## KONDIĈOJ DE ABONO

**Abono jara :** ) En Francando : 4 frankoj. } **Unu numero :**  
 ) Ekster — 5 fr. } 0 fr. 50, a frankite.

**Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj: oktobro, januaro aŭ marto. La Revuo ne aperas en aŭgusto nek en septembro. Postmarkoj estas akceptataj por efektiva valoro.**

**Anoncoj.** — Tuta pago kostos 15 frankojn ; — duona pago 7 fr. 50 ; — 4<sup>na</sup> pago : 4 fr. ; 8<sup>na</sup> pago 2 fr. 50 ; 16<sup>na</sup> pago : 2 fr. Por anoncoj ripetitaj, rabatoj : por tri fojoj 10 % ; — por ses fojoj : 15 % ; — por 10 fojoj : 20 %.

**KUN SES BELAJ ILUSTRAĴOJ  
KATO KUN BOTOJ.**

Kosto : 0 fr. 50, a frankite. Aĉetebla ĉe la Direktoro de E. K. Specialaj kondiĉoj por almenaŭ dek ekzempleroj kune mendataj.

**CINDRULINO, KUN SES ILUSTRAĴOJ**  
**N-o DUA DE LA ILUTTRITA ESPERANTA BIBLIOTEKO**  
 por infanoj.

**APEROS FINE DE MARTO**

**KATO KUN BOTOJ kaj CINDRULINO kune mendataj kostos nur 0,75, a frankite.**

**UNUA JARO DE REVUO E. K.**

Kolekto de la dek karejoj (88 pag).

**RAKONTOJ, ARTIKOLOJ DIVERSAJ PRI NUNTEMPAJ AFEROJ, K. T. P. — AFRANKITE : 2 fr.**

Ĉe la Direktoro de E. K.

**DUA JARO**

De E. K. estas ankaŭ aĉetebla je samaj kondiĉoj.

**La tuta kolekto ĝis marto 1906 : 5 frankojn.**

# ESPERO KATOLIKA

## ENHAVO

	Pages
LA DIREKTORO Libereco de diskutado.....	1
RELIGIA MOVADO : Romo.— La Papo en La Haga Konferenco.— « Religia Milito » en Franclando. — Kion oni pensas en Germanujo. — Katolikismo en Japanujo. — En Angllando	2
P-O A. DOMBROVSKI: Pri la naturo de transsubstanciigo (pri Eŭkaristia mistero).....	6
R. AUBIN : Epizodo de la « Religia Milito » en Franclando.....	9
LA KRISTANA UNUIGO : Diversaj leteroj. — Respondo de la Direktoro de E. K.....	11
P-O A. DOMBROVSKI : Poeto.....	15
UNU LIBRO MONATE : Eklezio mortigas !.....	17
EN ESPERANTUJO : Revuo de la Revuoj Esperantistaj (internaciaj kaj naciaj). — Notetoj. — Bibliografio	20
ABONMONOJ RICEVITAJ. — MONOFEROJ. — ŜAKOJ.....	20

## LIBERECO DE DISKUTADO

El diversaj flankoj oni petis, ke « Espero Katolika » estu larĝe malfermata al libera diskutado de diversaj opinioj.

Pli kaj pli, en nia epoko, la gazetoj enskribas tiun liberecon sur sia programo.

Ordinare oni deklaras, ke la aŭtoroj estas plene respondaj pri iliaj artikoloj, kaj ke la redakcio nur estas respondeca pri l'artikoloj subskribitaj de ĝi.

Estas io tre malfacila kaj ordinare senfrukta diskutadi opinionon en du diversaj gazetoj, kies unu publikigas respondojn de alia. Vole-nevole, oni ĉiuflanke ne ĉiam tre ĝuste raportas pri la opinio de l'kontraŭulo; oni prenas el lia respondo nur tion, kio plej taŭgas por lin rebati; kaj la leganto nur malklare povas koni la tutan veron.

Kontraŭe, kiam la plena diskutado fariĝas en la sama gazeto, donante ĉiam la plenan tekston de ĉiufankaj respondoj, tiam la leganto povas juĝi mem kaj formi sian personan opinionon.

Ni povus citi kelkajn katolikajn gazetojn francajn, kiuj tian liberecon lasas al ĝiaj kunlaborantoj (1).

Jam de l'apero de nia revuo ni proklamis tiun liberecon de diskutado: « Ĉiu abonanto povas sub sia respondeco persona verki por E.K. artikolojn pri ia objekto » En E. K. februara ni skribis:

1. Inter ili estas : *La Quinzaine* ; *La Justice Sociale* ; *Revue du Monde Invisible*, k. c.

« Ĉiu diskutado estas libereme akceptata. » Ni nur esceptis la *politikajn naciajn demandojn*.

Ni hodiaŭ iom pli detale klarigos nian penson :

« Espero katolika » estas tribuno tute libera, en kiu la nekatolikoj havas la rajton paroli tiel kiel la katolikoj.

Ni ĉiam publikigos diversajn aŭ kontraŭajn opiniojn pri sama punkto, kiam niaj legantoj sendos al ni kontraŭdirajn artikolojn. Sed kompreneble *ni lasas al ĉiu verkisto la plenan respondecon pri lia artikolo*. Avizo pri tio estos daŭre presita sur la kovrilo de la Revuo.

La Direktoro rezervas al si la rajton fini diskutadon, post sufiĉe longa klarigado de diversaj opinioj.

Ni tamen memorigas, ke libereco ne estas *senlima liberegeco*. Por esti bona kaj utila, libereco devas esti racia. Libereco politika ne donas rajton fari ĉion, kion oni deziras en la vivo nacia. Libereco morala ne donas permeson fari laŭvole malbonon. Libereco diskutada ne povas doni rajton diri sensencaĵojn, insultojn, incitojn al malbono, k. c.

Ni do akceptos nur raciajn, seriozajn, bonstile kaj ĝentile esprimitajn opiniojn.

Por tion efektiviĝi sendanĝere, ni akceptos nur artikolojn, kies verkistoj konigos sian nomon.

Anonimajn verkojn ni neniam presigos. (2)

Nu por komenci, ni proponas al la diskutado de niaj legantoj jenan temon :

SUR KIU FUNDAMENTO, LAŬ VIA OPINIO, ONI POVUS, NUNTEMPE, STARIGI PROSPERE LA MORALAN UNUECON DE L'HOMARO ?

EM. PELTIER, Direktoro de E. K.

## RELIGIA MOVADO

**Romo.** El Vatikano, la Papo observas la tutan universon kaj firme gvidas la barkon Petran. Li, nune, rigardadas precipe al Francando, el kie li timas ventegon.

La *Blanka Libro* tute klarigis, ke neniam kaj neniel la Papo deziris aŭ celis la disigon de Eklezio kaj Ŝtato en Francujo. La

2. — Se verkisto havas gravan motivon subskribi artikolon per pseŭdonimo, ni tion akceptos ; sed nur kondiĉe ke *ni konos* lian veran nomon kaj lian plenan adreson.

Encikliko al la Francoj plene kondamnas principe la « Leĝon de disiĝo ». Nun Pio X-a atendas la publikigon de la *Regularo administracia*, laŭ kiu oni aplikados la leĝon, por doni al l'Episkoparo franca praktikajn instruojn.

**La Papo en La Haga Konferenco.** Pli ol iu ajn ŝtatestro, la Papo havas rajton alesti la Pacan Konferencon. Oni memoras, ke la diplomatio Itala sukcesis elpeli Leon XIII-an el la 1-a Konferenco. Amika interparolado de la Italaj kaj Germanaj ministroj de Fremdaj Aferoj esperigas, ke Pio X-a estos reprezentata en la dua venonta konferenco. Tion antaŭ nelonge publikigis la ĵurnalo : *Avvenire d'Italia*, laŭ korespondado ricevita el Berlino.

**La « Religia Milito » en Francando.** Antaŭe ni parolis pri « religia krizo ». Nun la titolo, — kiel la situacio, — estas ŝanĝita. La Registaro volis farigi « etatojn » de la bienoj apartenantaj al la « Parokoj », Sed la fideluloj rifuzas, ke la registaraj agentoj eniru la Preĝejojn por fari tiujn etatojn. En multegaj lokoj, preskaŭ en tuta Francando, oni devis uzi perforton, ĝendarmojn kaj eĉ soldatojn, por apliki la leĝon. Oni legos poste la terurigan militatakon de l'Preĝejo Ste-Clotilde, en Parizo. Tio estas nur specimeno, kaj ne la pli grava, el la « religia milito », kaŭzita de la malbenita kaj tirana leĝo.

Nune oni « fortikigas » la preĝejojn, la kamparanoj ilin defendas per armiloj, la sango estas elverŝita. Jam kelkaj katolikoj estis mortigitaj. La juĝistoj plej severege kondamnas la ribelistojn, eĉ kiam ili estas junulinoj da 16-17 jaroj, defendantaj sian kredon kaj liberecon konsciencan. La eksciteco estas grandega inter la katolikoj. Oni tamen atendas la Regularon administracian, kaj la instrukciojn papajn. Tuj post la publikigo de tiu ĉi dokumento, la Episkopoj kunvenos en Parizo, por decidi pri la nova organizado de Eklezio en Francando.

**Kion oni pensas en Germanujo :** ni recevis de germanujo la jenan leteron :

« Oni ne bezonas esti sanktulo por kondamni la dramon, kiu nuntempe iĝas en Francujo. Kun preskaŭ nekredebla severeco estas punataj tiuj, kiuj ne alian teruran krimon faris ol bari al la oficistoj de framasona registaro la eniron en la domon de Dio. Kvankam oni ja certe ne povas aprobi la bataletojn de la katolikoj kontraŭ la ŝtatpotenco, tamen ĉi-tielajo estas tre komprenebla, se oni konsideras, ke la fidelaj anoj de l'eklezio

estis profunde ofendataj en siaj plej sanktaj sentoj. Aŭ ĉu la malĝentila kaj rabista enrompo en la tabernaklojn kun sa krolega mano ne montras fanatikan malamon, pro kiu la sendiaj framasonoj agadas pli abomene ol necivilizitaj sovaĝaj barbaruloj? Kaj vere, ne estas miraklo, se eĉ eminentaj sinjorinoj en elegantaj tualetoj batalis por sia plej sankta bieno. Pri tiaj heroinoj mi havas nur simpatian admiradon. Sed malgloriga estas kelkfoje la rolo, kiun la sodatoj kaj la policistoj devas ĉi-okaze ludi (oni pensu pri « almitado » de la preĝejo St-Pierre du Gros-Caillou !). Do estas tute nature, se germanaj ĵurnaloj ĉion tion juĝas iom malestimeme. Tiel ekzemple mi legis en granda gazeto la mokparolojn « Nun la franca armeo havas denove okazon por pruvi sian gloran kuraĝecon, nome dum la kalkuligo de la « etatoj » preĝejaj ! » Alia ĵurnalo rakontis estintaĵojn, kiuj klare montras, ke en Francando oni ĉiujn krimojn, eĉ la plej hontindajn, pli indulge traktas ol neri-proĉeblajn burĝojn, kiuj estis trovataj starante sur la ŝtuparo de preĝejo. Kaj tiu ĵurnalo plue diras « Tio pruvas perfekte, kiel fartas la lando, en kiu antaŭ nelonge ia granda gazeto diris :

« Il y a quelque chose de pourri en Allemagne » (1). Sed en Francujo oni rimarkas jam universalan putriĝon ! »

Ĉiuj tiuj neaŭditaj maljustecoj estas des pli bedaŭrindaj, ĉar ili okazas en ŝtato, kiu kiel devizo elektis la fierajn vortojn « Liberté, égalité, fraternité ! ». « Libereco, egaleco, frateco ! » Ŝajnas al mi, ke Francujo tiun-ĉi devizon havas tial ke, tie, jam ne plu troviĝas tiuj laŭdindaj ecoj !

Sed aliflanke estas ankaŭ bedaŭrinde, ke la katolikoj francaj, pro siaj partiaj interesoj politikaj, ne volas unuiĝi kaj starigi kontraŭ la agado de la framasonaro, kiu tute ruinigos la landon.

Ĉu ŝtato sen religio ne estas neekzisteblaĵo ? La historio de ĉiuj temporoj ĉi-tion sufiĉe pruvas. Ekkomparu nur unu momenton, la situacion en Germanujo ! Eĉ ĝiaj plej malamikemaj kontraŭuloj devas konfesi, ke nia lando floradas kaj prosperadas kiel malmultaj. Sed jen ! La imperiestro mem es-

---

1.— Estas io pntrita en germanujo.



tas tre religiema kaj ne hontas ankaŭ pruvi tion ĉiam kaj ĉie ; la loĝantaro en sia plejmulto konservas fidele la piajn morojn kaj kutimojn de la prapatroj kaj ankaŭ ĉe nia armeo oni trovas la religian kredon. Estas ja ĉie konate, ke dum la milito de 1870-71, la franclandanoj, vidante ke niaj soldatoj libervole vizitadis la preĝejojn, mirante ekkris :

« Vere, tiaj militistoj devas necese venki, ĉar ili ja preĝas ! » Kaj kiu en la hospitaloj vidis morti la bavariajn soldatojn, tiu ekkriis kun larmoj « Jen bavariaj soldatoj, kiuj mortas kiel sanktuloj ! »

Sed nun mi finas tiun ĉi temon. Kiel ajn formiĝos la okazontaĵoj, estas tute senduba, ke nenia malamo, ke nenia penado, ke nenia fortego, ke nenia potenco povos iam detrui la sanktan eklezion de Dio. Ĉiuj persekutistoj devis kaj devos ĉiam fari tiun sperton. Oni memoru, ke post la germana « kulturbatalado », (dum la jaroj de 1871 ĝis 1879) eĉ ankaŭ Bismarck devis fine iri al « Canossa ».

Eterne ja restas vera la ĉiam efektiviĝanta promeso de Jesu-Kristo : « Tu es Petrus et super hanc petram aedificabo ecclesiam meam et portae inferi non praevallebunt adversus eam ! » (Verkis Zacherl Charles, el Passaŭ, Germanujo.)

**Katolikismo en Japanujo** : Ni jam parolis pri la sendito de Papo en Japanujo, Episkopo O'Connell. Li estis tre solene ricevita de l'Mikado, en Tokio, kaj same de l'Universitataj Profesoroj kaj studentoj. En grandega kunveno ĉeesti-4000 personoj. Paroladoj estis faritaj de P-o Anezaki, profesoro nekristano de komparataj religioj. Li antaŭ ne longe vojaĝadis tra Eŭropo kaj konstatis, ke l'katolikismo ne estas ligata al mortintaj aferoj, ke kontraŭe ĝi sin montras kiel la plej potenca kaj fortika religia filozofio, kiun konas la homaro ; — kaj tion li publike deklariis. S-o Shimada, la dua parolanto, pritraktis jenan temon : *Eklesio Katolika kaj Civilizacio*. S-o Lloyd, protestanto, parolis, — ĉu ne rimarkinde ! — pri la japanaj martiroj. Japana katolika pastro Maeda parolis pri « Roma Papo kaj lia influo en la mondo ». Fine parolis Episkopo O'Connell. Li montris en la ordono de Jesu-Kristo « Iru kaj instruu ĉiujn naciojn », la fonton de unueco, de katolikeco kaj universaleco.

Li konstatis, ke la forto de l'Japana nacio venas de ĝia unueco fortika. Tondraj aplaŭdoj salutis Episkopon O'Connell.

Jen tia popolo, kiun oni provis priskribi kiel senreligia ! En jaro 1902, la nombro de religiaj verkoj altiĝis ĝis 1134.

La Ĝstro de l'Japanaj « Bonzoj » vizitis Episkopon O'Connell kaj diris al li : « Mi deziris vidi vin ; estus al mi tre agrabla viziti Romon, kie loĝadas la posteulo de Petro. Tial ke mi ne povas, mi petas, ke vi prezentu al Papo l'esprimon de miaj plej profundaj kaj respektaj sentoj ».

Alia Budisto donis larĝan kampon, por tie konstrui katolikan preĝejon.

**En Angllando** La *Dublin Review* (Dublin'a Revuo) katolika, trimonata, estas nun direktata de l'fama verkisto, S-o Wilfrid Ward. Li estas filo de unu el tiuj inteligentuloj, kiuj partoprenis la movadon idean nomitan *Oksford'a movado*, ĉirkaŭ jaro 1840. S-o W Ward okupas la unuan vicon inter la katolikaj verkistoj de Anglujo. La *Historio de Kardinalo Wiseman* sufiĉas por « famigi » verkiston.

La *Dublin Review* jam ŝatinde pliboniĝis. Jen kelkaj titoloj el l'artikolaro « Manning kaj Gladstone », de R. P. Kent ; « Impresoj ricevitaj en Ameriko katolika », de Dom Gasquet ; « Situacio de Franca Eklezio », de P. Dimnet (Franco).

## PRI LA NATURO DE TRANSSUBSTANCIĜO.

(Nova provo por klarigi la Eŭkaristian misteron.)

Ekzistas multaj teologiaj verkoj pri la Eŭkaristio. Ĉiujare eliradas novaj libroj pri tiu ĉi mistero. Sed bedaŭrinde, anstataŭ esti per ili pli klarigita, ĝi fariĝas por la nuntempa homo pli kaj pli malkomprenebla. De kio tio ĉi devenas ? ĉu de interna naturo de l'mistero mem ? Respondi jese tiun ĉi demandon ŝajnas neprave. Ĉar la Eŭkaristio ne estas per si mem pli malkomprenebla ol aliaj misteroj de nia kredo. Se la plej Sanktan Sakramenton nun ĉirkaŭadas mallumo pli granda, ĝi ŝajnas esti kaŭzita pli pro la malnova aristotelia teorio pri naturo de korpoj, kiel kunmetitaĵoj de *materio* kaj *formo*, ol pro la Eŭkaristia mistero mem.

Sciante tion ĉi Pro A. Leray en sia verketo : « *Le dogme de*



*l'Éucharistie ; Essai d'explication ;» Paris 1900*, pensis klarigi la Eŭkaristion per konsideroj plialproksimigitaj al la nuntempa stato de sciencoj fizika kaj kemia. Multajn starigitajn de li principojn ni trovis tre bonaj kaj raciaj ; sed kelkaj aliaj ŝajnis al ni tute neakcepteblaj. El tiu ĉi kaŭzo ni komencis nia-vice pripensadi la Eŭkaristian demandon kaj alvenis al rezultatoj iom diversaj de la Leray'aj. Nehavante la senerarecon kaj serĉante nur la veron, ni proponas niajn konsiderojn pri la Eŭkaristio al la atento de ĉiuj pensantaj Kristanoj, petante humile ilian plej severan kritikon. Niaj konsideroj alkondukiĝas al la senkvantaĵo

1° La Eŭkaristian misteron devas klarigi povas nur la ĝusta klarigo de la sakramenta *transsubstanciigo*. La sakramenta do transsubstanciigo de pano kaj vino en la Korpon Kristan ne povas esti ĝuste klarigita, ĝis kiam la terminoj ; *substancio de pano, de vino, kaj de Korpo Krista* restados komprenataj laŭ aristotele.

2° El tiu ĉi kaŭzo nian klarigon de la Eŭkaristio ni starigas sur la fundamento de hodiaŭaj fizikaj kaj kemiaj teorioj pri materio. Laŭ ili substancio de pano konsistas el molekuloj amidonaj, albuminaj, kazeinaj, fibrinaj, glutinaj, k. a. ; la substancio de vino, el molekuloj akvaj, alkoholaj, sukeraĵ, k. a. Plue molekuloj de pano kaj de vino estas siavice kunmetitaĵoj aŭ arroj de *atomoj*, — oksigenaj, karbaj, hidrogenaj k. a. . Ion similan oni devas ankaŭ diri pri la homa korpo, kiu laŭ fina analizo estas nenio alia ol atoma kunmetitaĵo.

3° Laŭ hodiaŭa kemio la atomoj el unu kunmetitaĵo povas transiri en la alian ; ekzemple, la atomoj oksigenaj, karbaj, k. a. de pano kaj vino povas aliĝi al homa korpo kaj fariĝi ĝia plena propraĵo. Per tia interna aliĝo la pano kaj vino, prenitaj kiel nutraĵo, transsubstanciĝas en homan korpon. La naturo de tiu ĉi *fizika ordinara transsubstanciigo* konsistas tiamaniere en tio, ke la atomoj, apartenintaj antaŭe al pano kaj vino, disigitaj per la fiziologia proceso de digestado, eniras homan organismo kaj ĉesante aparteni al la *pano kaj vino*, fariĝas *apartenantaj al homo, kiel veraj partetoj de la korpo*.

4° Tute *analogie* devas esti komprenata ankaŭ la transsubs-

tanciigo *hiperfizika* en la Eŭkaristio. Ĝi konsistas en tio, ke la atomoj apartenintaj antaŭ la konsekrecio al pano kaj vino, ĉesinte post konsekrecio aparteni al pano kaj vino, *fariĝas apartenantaj al Kristo, kiel atomoj de lia Korpo*. Antaŭ la konsekrecio la Kristo povas diri: tiuj ĉi atomoj ne estas *miaj*, ĉar ne estas *miakorpaj*; ili estas nur *panaj, vinaj*. Post konsekrecio, kontraŭe, Li ne sole povas, sed ankaŭ *devas* diri tiuj ĉi atomoj, estinte antaŭe panaj, vinaj, nun jam, aŭ leĝo de mi mem donita, *ne estas panaj aŭ vinaj, sed estas miaj persone, kiel miakorpaj*, kaj ilia aro estas *mia korpo*, alprenita de mi en unuecon personan tiel same, kiel antaŭe estis de mi alprenita la homa naturo dum mia enkorpiĝo en Maria utero.

5° La jus difinita hiperfizika sakramenta transsubtanciigo certe estas *ne identa*, sed nur *analogia* je la transsubstanciigo ordinara fizika. En tiu ĉi lasta la atomoj, kiel oni scias, ordinare disiĝas por transiri el unu kunmetitaĵo en la alian. En la transsubstanciigo do hiperfizika la disiĝo tute ne okazas; la atomoj panaj kaj vinaj post konsekrecio, farinĝinte Kristakorpaj, daŭradas restadi en tiuj samaj internaj reciprokaj rilatoj, en kiuj ili estis antaŭ konsekrecio. El tiu ĉi kaŭzo niaj sentoj povas rimarki nenian ŝanĝon en la sakramenta materio post konsekrecio. Se hostio nekonskreciita konsistis el *m* diversaj atomoj, tiu ĉi nombro restas neŝanĝita ankaŭ en hostio konskreciita, sed tiuj *m* atomoj estas *ne panaj sed Kristakorpaj* (1).

6° Malgraŭ pli aŭ malpli granda nombro da atomoj en la hostio konskreciita ĉiu kristano ricevas en la komuniigo la tutan *Kristan Korpon*. Tio ĉi klariĝas per la instruo Eklezia, kiun S-o Tomo Akvina esprimas je ne *tota dimensiva corporis Christi quantitas est in hoc sacramento non quidem ex vi sacramenti, sed EXREALI CONCOMITANTIA*. (S. T. 3a-9. 76a. 4.) Tial se la hostio konsistas el  $m+n$  atomoj, la tuta do Krista korpo en *mu* atomoj post konsekrecio en la hostio konskreciita *m* atomoj de Krista Korpo estos *ex vi sacramenti*, la restantoj do *n ex reali concomitantia*. El tio ĉi vidiĝas, ke ĉu iu pre-

1. — Kun atomoj okaazs tie ĉi iĝo simila, kio fariĝas kun moneroj, transirantaj de unu posedanto al la alia, aŭ kun matematikaj grandaĵoj ĉe kiuj oni ŝanĝas nur solan signon — en + en aŭ kontraŭe.

nus duonon da hostio konsekraciita, aŭ eĉ unu ĝian atomon ĉiam kaj en ĉiu okazo li estus preninta la Kristan Korpon, konsistantan el  $m+n$  atomoj.

7<sup>e</sup> Ĉar per la konsekrecio la atomoj de hostio estas transsubstanciigitaj nur hiperfizike, fizike do ili estas tute neŝanĝitaj kaj daŭradas restadi en tiuj samaj atomaj interrilatoj en kiu ili estis antaŭ konsekrecio, tial la konsekraciita hostio obeas al ĉiuj fiziko-kemiaj leĝoj tute same, kiel hostio nekonssekraciita: ĝi povas putriĝi, solviĝi per digesto en la stomako. k. t. p., kaj kiam tio ĉi okazas la atomoj de Krista sakramenta korpo, laŭ leĝo de Kristo mem starigita, ĉesas aparteni al Kristo, ĉesas esti *Liakorpaj* kaj komencas aparteni al homa korpo aŭ al aliaj fizikaj korpoj, en kiujn a sakramenta materio nekonssekraciita laŭ leĝoj de materio ordinare ŝanĝiĝas.

8<sup>e</sup> El la supra diritaĵo la atenta leganto povas vidi, ke nia klarigo de l'Eŭkaristia mistero forigas multajn malfacilaĵojn, kiujn amasigis la malnova skolastika klarigo de tiu ĉi dogmo; la Eŭkaristio, konsiderata sur la fundamento de nuntempa scienco, fariĝas mistero eĉ pli klara kaj pli komprenebla ol la aliaj misteroj de nia kredo. Ni kuraĝas eĉ opinii, ke se S-o Tomo Akvina estus vivinta en nia centjaro, li plene alvenus al tiuj samaj aŭ similaj rezultoj en siaj pensoj por klarigi la Eŭkaristian Misteron. Tial finante nian artikolon, ni kuraĝas ekkrii: legu, estimata leganto, suprajn konsiderojn, ilin pripensu, sed nur memorante, ke nia diritaĵo estas nenio alia, ol opinio de privata katolika teologiisto, kiu serĉante la veron, estas ĉiam preta obei al la aŭtoritata instruo de sola senerara instruo sur la tero, nome de vera Krista Eklezio.

Pastro A. DOMBROVSKI.  
(El. S. Peterburgo).

---

## EPIZODO DE LA “ RELIGIA MILITO ”

### MILITATAKO DE L'PREĜEJO SAINTE-CLOTILDE EN PARIZO.

Je la unua horo, la preĝejo estis plena je popolamaso tre ekscitita kaj militema. Inter la ĉeestantoj, estas multaj politikaj homoj. S-roj Paul Lerolle, de Ramel, Louis Ollivier, Denys

Cochin, kaj aliaj deputatoj ; Jacques Piou, Melchior de Voguë, la duko de Chartres k. a., k. a.

Je la kvarono de la dua, la polico aperis. S-ro Ménant, la direktoro de l' « Urbaj Aferoj », alvenis por interparoli kun P-ro Gardey, parokestro de Ste Clotilde ; li provas inciti katolikojn al kvieteco ; sed tion vidante la popolo lin puŝegas kaj elirigas el preĝejo ; li povas trovi rifuĝejon nur en la polica posteno de l' strato Grenelle.

Antaŭ la pordo de la preĝejo komencas bataladoj, kaj la policianoj uzas iliajn glavojn por forpuŝi la popolamason el la strato, sed la manifestantoj iĝas pli kaj pli multaj ; estas jam perfortaj batigoj ; multaj manifestantoj estas arestataj de la policianoj kaj centoj da voĉoj ekkrias « For, for la kaseroloj : (1) Libereco ! Libereco ! » ; kaj kantas himnojn.

Interne de la preĝejo, la katolikaj malpacientiĝas kaj nur je la tria horo la fisk-agento alvenaskun la policestro, sed ili konstatas, ke la pordoj estas fermitaj, ili sendas al la « Interna Ministraro » por ricevi ordonojn.

La policestro ordonas je la kvina, ke oni perforte eniru la preĝejon, kaj la gardistoj volas disrompi la ferajn kradojn, kiuj ĉirkaŭas la preĝejon. Sed la manifestantoj ilin defendas. Tiam gardistoj kaj policianoj, kiel furiozaj frenezuloj, aliras kontraŭ la popolamason. La ligna dika parto de l' pafilo falas sur kapojn kaj sur dorsojn homajn, ĉapeloj forflugas ; vestaĵoj deŝiriĝas ; la sango fluas ; la buĉado fariĝas terura.

Tamen la fideluloj defendas la Preĝejan eniron per bastonaj, seĝaj kaj pugnaj batoj, ĉie aŭdiĝas la kriegoj de infanoj kaj de virinoj, ĉar la policianoj, pli kaj pli furiozaj, antaŭeniras, frapadas, trabatas per la piedoj kaj puŝegas. Kaj oni vidas infanojn, virinojn, maljunulojn, homojn kaj pastrojn ĵetataj el la supro de l' ŝtuparo.

Fine la polico regas sur la bataalkampo kaj la gardistoj eniras la preĝejon. Tie, en duon-mallumo, rekomencas kruelega kaj bedaŭrinda batalado. — La defandantoj de la preĝejo kaj la atakantoj falas inter la rompitaĵoj seĝoj ; — oni vidas nur san-

---

1. — *Kaseroloj* : Vorto per kiu oni nomas en Francando, tiujn, kiuj denuncas la honestajn homojn, kiam ili estas katolikaj.

gokovritajn vizaĝojn, kaj ŝiritajnvestojn; virinoj teruritaĵsvenas; aliaj insultas la gardistojn, la policianojn kaj krias: « Malkuraĝuloj! malkuraĝuloj! vi estas kuraĝaj nur kontraŭ virinoj! »

Dume, la tumultsonorilo ĉiam sonoradas kaj la poliestro rekvizicias la fajrpumpilistojn, kaj fine je kvina horo, la venko restas al la leĝo! Sed kiel kostega venko!!

Ĉie vidiĝas multaj kaj larĝaj sangomakuloj! Kaj je la kvarono de la kvina, oni komencas skribi l' « Etaton » de la preĝejo. Ĝi estas farita de fiskagento, timanta kaj malkuraĝa, kiu estas protektata de pli ol cent gardistoj aŭ policianoj! Tamen li baldaŭ eliras sub kriadoj de la ĉeestantoj.

Ĉu tia sceno ne ŝajnas malbona sonĝo?

R. AUBIN.

## POR UNUIGO DE KRISTANARO.

Jen kelkaj el la leteroj, kiujn mi ricevis, post la publikigo de mia « *Letero al ĉiuj pastroj kristanaj* »

Respektinda kaj altestimata S-o kaj kara kunfrato.

Ĝoje mi konstatas ke vi laŭdinde persistas celante verigi kaj efektivigi la devizon de E. K. « UNUM OVILE ET UNUS PASTOR. » Kiam oni konsideras la aferon de tiel alte kiel vi, oni neniel povas ne aprobi tiun celon vere humanan kaj pacigan, tute papan kaj kristan. Mi ne dubas ke multaj aliĝos al vi. Sed bedaŭrinde ĉiuj ne komprenas aŭ ne volas kompreni. Sed eble tio plejmulte kaj plejofte okazas pro tio ke ĉiuj ne sufiĉe scias la esencan celon de l'afero, nome la interpacigon de la nacioj, la kunfratigon de la tuta homaro.

Historie pruvita estas ke pro nenia kaŭzo ekzistis kaj ekzistas ankoraŭ nune en la mondo tiom da militoj, tiom da malamikoj ol pro kaŭzo religia.

Certe se la pastroj, la rajtaj kondukantoj de l'popoloj rilate al la religiaĵoj, interkonsentos pri la interpacigo, pri la reciproka amo kaj kune laboros por trafi la saman celon, sendube la eksteraĵo de l'tero baldaŭ renoviĝos. Kiu dubas, ke inter la pastroj ankaŭ alireligiaj estas multaj, kiuj verege nur celas la bonestadon de siaj kunreligianoj? Se do tiuj bonaj elementoj kuniĝos por la sama celo, baldaŭ, almenaŭ laŭparte, la granda

celo estos trafita, Tutkore mi tion kun vi esperas, petante ke Dio bonvolu helpi vin kaj alsendi lumradion al la « TUTA KRISTANA PASTRARO. »

Kun sinceraj deziroj por via sano, bonfarto, kaj prospera sukceso, tute via en Kristo,

C. J. van Oevelen, el Zoersel (Belgujo).

#### ESTIMATA DIREKTORO

Certe mi deziras kun pastroj diverkristanaj fratiĝi, sed kvankam atente la publikan al pastroj leteron mi estas leginta, mi ne perfekte komprenis efektojn de tiu frateco.

Kiun celon vi esperas atingi? ĉu nur amikan interparoladon? Tio estos facila.-Sed ĉu vi povos ebenigi malpacojn en dogmaro? Mi ne esperas. Jen estas tamen, ŝajnas al mi, sola kaj vere dezirinda celo.

Pardonu mian sincerecon; eble mi tute ne komprenis vian penson, sed mi aprobas la « UNUIĜON ».

Kun estimo kaj amika saluto

P-o Requin, el Draguignan (Francujo)

#### ESTIMATA SINJOR'ABATO,

Mi tre atente legis vian rimarkindan leteron, en kiu vi alvokas la tutan kristanaron al « UNUIĜO » en kaj per Esperanto. Mi tutkore aprobas tiun tre ŝatindan ideon; sed bedaŭrinde mi timas, ke vi ne sukcesos en via entrepreno, ĉar vi volas varbi sub speciala stantardo la ĝeneralecon de la kristanaro. Katolikismo estas nur ero en la aro kristana, kaj ĉiuj, kiuj ne konsentas pri la formulaĵo katolika, kiuj kontraŭe akceptas formulaĵon ne konsentitan de la katolikestro, devige restos, eble kun bedaŭro, sed tamen restos ekster via tendaro.

Laŭ mia opinio, se vi volas sukcesi, la titolo mem de via revuo estas ŝanĝota: anstataŭ la vorto « KATOLIKA », kiu ŝajnas iom sekta, metu la vorton « KRISTANA »: kaj sendube vi altiros al vi la tutan religian homaron. Tia revo estas sufiĉe alloga por entuziasmigi apostolon, tiel amplenan al la supera religio, kiel vi.

Volu akcepti, estimata sinjor'abato, la certigon de mia plej sincera respekto,

Dro Vallienne, el Parizo (Francujo).



*La 2an de Februaro 1906*

Respektinda Pastro kaj kara frato,

Mi estas pastro en la angla ŝtateklezio. Mia paroĥo estas en la eparkio de Ely, kaj ĝi estas vilaĝo preskaŭ 30 kilometrojn nord-oriente de Cambridge, ĉirkaŭ 100 kilometrojn norde de Londono. Mi estas nun sesdekkvin-jara.

Mi ĉeestis kun mia edzino en la ĝardeno de la Boulogne-a Kazino kaj kavis la grandon plezuron aŭdi vian elokventan paroladon pri frateco. Antaŭ kvar tagoj mi ricevis la E. K. de Januaro, kaj renovigis tiun plezuron legante vian kortuŝantan kaj vere Kristanan leteron pri la sama temo: mia koro jese respondas al viaj sentoj, viaj esperoj, viaj preĝoj. Se per nia kara lingvo la dividitaj servantoj de nia unu Sinjoro povus alproksimiĝi nur kelkajn paŝojn unu al alia, tia frukto de niaj klopodoj estus vere benplena kaj glora.

Mi ne klare komprenas kion vi efektive proponas, sed mi kore aliĝas al viaj ideoj.

Tamen pri unu ebla danĝero mi volas fari demandon. Eble en via eklezio — eble inter ĝia estraro — oni trovos kelkajn dogm-amantojn, kiuj diros: « Kiel? Frateco kun herezuloj dum ili restas obstinaj en sia herezo! Tio ne estas permesebla al katolikoj: kaj se tiu ĉi lingvo estas pero de tia malbona frateco, oni devos malpermesi katolikojn lerni ĝin. » Ĉu ne tia danĝero estas ebla? Mi pensas ke eble kelkaj protestantoj dirus: « Jen tiu ĉi nomita helpa lingvo! Ĝi ne helpas simple la internacian komunikadon, sed la ruzojn de tiu. j kiuj deziras denove submeti nin al la juĝo de Roma tiraneco. » Mi timas do ke oni kulpigos nian lingvon kaj atakoŝ ĝin, se oni suspektos ke ĝi havas ian kaŝitan celon religian. Tiamaniere ni eble malhelpos la deziritan fratecon kaj la disvastigadon de nia kara lingvo. Pardonu al mi, kara frato en Kristo, se mi ŝajnas ĵeti malvarman akvon sur vian fervoron. Mia simpatio estas plene kun vi: sed mi pensas ke ni devas memori ke la « malnovaj malkonsentoj » estas ĉe multaj Kristanoj ankoraŭ tre gravaj, kaj ne estas saĝe ofendi eĉ la neraciulojn.

Akceptu fratajn salutojn kaj koran manpremon de Via sincera kunlaboranto.

John CYPRIAN RUST,

el SOHAM, ANGLUJO.

Nun mi mallonge respondos la supre cititajn leterojn.

Mia celo, — atingota kredeble nur post longa tempo, — estas la reunuiĝo de la diversaj kristanaj eklezioj. Mi tre bone scias, ke grandaj estas la baroj al tia celo; ankaŭ mi komprenas ke la malfortaj klopodoj de kelkaj ne ŝanĝos la religiajn aferojn de l'mondo en la daŭro de kelkaj jaroj. Sed se la celo estas bonega kaj ŝatinda, se la entrepreno ne estas ĥimera, kial ne komenci la laboron?

La unuaj apostoloj de ideo ia estas ĉiam malmultaj kaj malfortaj; ili preskaŭ neniam venkas mem. Sed aliaj venas, post ili, daŭrigas la laboron kaj post multegaj jaroj, — eĉ post jarcentoj, — la semaro kreskadas kaj venas ĝojiga rikolto...

Tiel fariĝis pri Esperantismo, pri pacifismo; tiel okazis pri la unua semado de Kristo kaj de liaj apostoloj.

Ni do devas ĉiam rigardadi la sanktan celon, ne kun espero, ke ni mem ĝin atingos sed por fortikigi niajn korojn kaj pli bone distingi la rimedojn uzindajn.

Al P-ro Requin, mi respondas la malpacoj kaŭzitaj de dogmoj, kiel aliaj malkonsentoj, povas esti paceme diskutataj. Progresado de la historiaj studoj, pli bona kompreno de la tekstoj de l' Sankta Skribo aŭ de la Sanktaj Patroj, permesas esperi, ke kelkaj dogmoj estos pli akcepteblaj nune ol antaŭe, por niaj frattoj kristanoj nekatolikaj. Ankaŭ ni devas konfesi, ke kelkaj instruoj estis iom trogravigitaj de tro fervoraj teologiistoj; kelkaj punktoj estis instruitaj kiel *absolute* konsekvencaj de dogmo, kiuj eble ne estas tiel absolute dogmaj. Unuvorte, oni povas diskutadi paceme pri la teologiistaj instruoj kaj pri la klarigoj liveritaj koncerne la dogmoj (kiel saĝe faras P-o Dombrowski en sia artikolo pri Eŭkaristio).

Al Pastro J.C. Rust, kiu timas, ke oni konfuzu la celon de Esperanto kun celo religia, mi respondas Ĉerte estas kelkaj tiel en mia eklezio, kiel en via, kiuj ne komprenos, ke diversreligianoj fratigu. Ĉerte kelkaj kulpigos Esperanton pro tio, kion ili nomas malbonan kaj malŝatindan entreprenon. Sed ĉu Esperanto estas amuzilo? ĉu gi estas uzebla nur por interŝanĝo de poŝtkartoj? aŭ ĉu Esperanto estas utiligebla kiel progresilo por la homaro? — Al tiuj, kiuj kulpigos Esperanton, ni simple res-

pondos : « Esperanto estas neŭtrala lingvo, *nenies propraĵo*. Katolikoj, protestantoj, framasonoj, socialistoj povas ĝin uzi kiel propagandilo de siaj ideoj. Oni ne pli devas kulpigi Esperanton pro la ideoj divastigitaj per ĝi, ol oni kulpigas la elpensinton de la presarto pro sama kaŭzo ».

Mi ne kredas, ke estas necese ŝanĝi la titolon de E. K., kiel deziras Dro Vallienne. Tion mi tuj farus, se la « UNUIĜO DE KRISTANARO » estus la sola celo de « E. K. »; ĝi estas nur unu el la punktoj de ĝia programo. — Mi, ankaŭ ne esperas tuj « *varbi la ĝeneralecon de la Kristanaro* » ; sed mi kredas ke nune ekzistas, en la diversaj eklezioj kristanaj, kelkaj altaj kaj paĉemaj spiritoj, kiuj konsentos unuiĝi kaj kune klopodi por prepari la dezirindan reunuiĝon. Tiuj homoj espereble kreos en sia eklezio, per longa laborado, per libra kaj gazeta agado, spiriton favoran al la reunuiĝo ; aliaj homoj kuniĝos kun la unuaj, grupiĝos en ĉiu diversa eklezio kaj formos diversreligian societeton, kiu celos la reunuiĝon en « unu ŝafaro ».

La unua paŝo estas, laŭ mia opinio, krei « Societon de studoj por la Unuiĝo de Kristanaro ». Mi sendis alvokon al la pastroj; sed mi tre ŝatus, ke laikoj ankaŭ partoprenu en la studoj. — Oni unue difinus kelkajn punktojn pridiskutotajn. Rondiranta manuskripto tre taŭgus por komuniki la studojn al la societanoj. « E. K. » estus plene malfermita al la diskutado, kaj oni povus en ĝi publikigi la studaĵojn de l'Rondiranto.

Sed tio estas nur opinio. Se iu havos pli bonan aŭ pli praktikan ideon, mi petas, ke li bonvolu ĝin konigi. Mi plezure publikigos ĉiun opinion.

La Direktoro de E. K.

---

## POETO <sup>1</sup>

Sentante la inspiran lumon  
 Poeto kanti ekdeziris :  
 Sidiĝis, prenis sian plumon  
 Por verki, sed... afer' ne iris.

---

1. El la beleta «Versajareto », de P-ro A. Dombrowski aĉetinda libreto da 30 paĝoj. Prezo: 30 kop. aĉetebla ĉe la Direktoro de E. K. (5 centimojn plej por afranko).

Ho muzo, li ekplendis bola, —  
 Pro kio do vi turmentas?  
 Kial per via voĉo mola  
 Min vanajn sonojn kapti tentas?

Kial al kanto min vokinte,  
 Ekpunas per la helprifuzo?  
 Kial ideon ek trovinte,  
 Ne trovas vortojn mi, ho muzo?....

Kaj li silentis pripensanta,  
 Kaj silentadis lia liro....,  
 Sed jen en la anim'revanta  
 Aŭdiĝis la forta diro

Poet', forĵetu vanajn revojn!  
 Malnova for dirmaniero!  
 Mi Di'difinas viajn devojn,  
 Ne la antikva muz'himero!

Mi la verkisto de l'mondaro,  
 Mi sola fonto de la belo, —  
 Elsendas vin al homaro,  
 Por alta, glora, sankta celo.

Jen mia vol' : en kanta sono,  
 En tuta via vivekzisto, —  
 Vi estu en la sampersono,  
 Poet', profet', kaj predikisto.

Krom la vidita per okulo  
 En mond' la belo ekzistanta,  
 Vi kantu, mia senditulo,  
 Pri idealo naskiĝanta!

Kaj kian ajn vi prenos temon,  
 Eviti penu pekajn tentojn, —  
 Nur bonan semu vortan semon,  
 Nur bonajn vi ekscitu sentojn.

P-ro A. DOMBROVSKI.

## UNU LIBRO MONATE

## EKLEZIO MORTIĜAS !

## EKLEZIO ESTAS MORTINTA ! (1)

Sinjoro abato Barbier, parokestro dekanano en Beaugency, ĵus publikigis, sub tiu titolo, libron pri tre interesa nunajo. Jen analizo de tiu bela verko.

*La funebra sonorado*

La famaj estroj de la libera pensado : Zola, Comte, Renan. Jaures, Aulard, ĝin sonigas per ambaŭ brakoj de pli ol kvarono de jarcento. Laŭ ili la Eklezio estas mortinta, senviva korpo, kiun enterigi oni forgesis. Sed ne estas malfacile vidi, ke tiuj antaŭdirantoj pri baldaŭa malapero de Eklezio estas nur :

*Malveraj profetoj.*

La pli multo da ili estas malhumiluloj, pro sia scio aŭ populareco, kiun ili akiris trograndigante siajn dezirojn kaj ilin estimante kiel realaĵoj. Iliaj certigoj bezonas esti kontrolataj. Ilin atente ni esploru kaj unue ni faru :

*Lojalan konfeson.*

Estas certe, ke en la nuna momento la katolika Eklezio estas maldelikate kontraŭbatalata. Cetere ĝi estis ĉiam kontraŭbatalata, eĉ dum la jarcentoj de kredo. La civila estraro de longe el ĝi apartiĝis. Estraro ĉesis sin montri neŭtra por fariĝi malamika. La malreligiaj sektoj tion utiligis por fariĝi duoble agemaj kaj maltimaj. La gazetaro estas preskaŭ tute en iliaj manoj. La praktiko de la religio en multaj lokoj forlasiĝis ; la kamparano kaj la urbana laboristo forgesis la vojon al la preĝejo. Tio estas vera. Ĉu la Eklezio estas mortinta ? Ne ! ĉar,

*Oni ne penadas mortigi la mortintojn,*

Kaj oni klopodas, pli ol iam por mortigi Eklezion. Vidu kia sennombra armeo rapidas senripoze por ataki ĝiajn fortikaĵojn ! La malpiaj gazetoj, la paroladistoj de la libera-pensado, la salajrigitaj ribelistoj, la politikistoj de la « Butertelero », ne kalkulante la amason de l'sklavoj, kiuj pro timo aŭ pro kalkulado pli ol pro konvinko obeas la ĉefojn. Fine kaj precipe la framasonoj, kiuj el la fundo de siaj loĝioj aranĝas kaj kondukas la militadon. Ĉiuj tiuj homoj elpensis la vorton « klerikalismo »

1. — *L'Eglise se meurt ! L'Eglise est morte !* france verkita.

por pli facile kaŝi sian taktikon. La batalado, kiun ili faras estas senkompata ; ĉio, por ili estas bona rimedo ! Ili ne perdas tempon ! Sed kion tio pruvas ? nur ke la Eklezio ne ankoraŭ mortis.

Ĝi vivas, kontraŭe, pli ol iam. Ni surmetas ĉiam krucojn sur la tombojn de niaj mortintoj. Nun pli multe da homoj vizitadas preĝejon ol antaŭ cent jaroj. Se la regionoj, kie ni vivas, estas indiferentemaj, estas aliaj kiuj restis praktikantaj. En niaj provincoj, ĉe la ĉefaj festaj tagoj, tute plena estas la preĝejo. Preskaŭ ĉiuj infanoj plenumas sian unuan komuniĝon. La homoj plej malreligiaj baptigas siajn idojn, religie edziĝas, kaj antaŭ ol morti, sin konfesas. Tio ne estas ĉio : esplorante pli atente, oni vidas, ke l'Eklezio posedas :

### *Grandegan potencon, kiu estas*

Ĝia hierarkio. Ĝiaj estroj, kvankam persekutataj, kalumniataj, estas tamen obeataj. La pastraro laboradas pli ol iam. Kun tio oni estas neniam venkota. Estas ankoraŭ,

### *Aliaj signoj de viveco.*

La katolika fervoro en Francujo estas ĉiam nekonsumebla. Lernejoj, laborejoj, kluboj, ĵurnaloj, paroladoj, ĉio estis fondata kaj subtenata, entute de la katolikoj. Oni denove konstruis la preĝejojn, oni provizis la misiistojn ; la pilgrimoj estas denove more akceptitaj, kaj alkondukas Romon, Lourdes'on, Montmarre'on kaj Jerusalemon, multegan popolamason. Neniam montrigis tia klopodo por la bono. Cetere Franclando montris sian katolikan vivecon, kiam, malgraŭ ĉiuj bariloj, ĝi daŭrigis varbi

### *Siajn pastrojn.*

Kiom da bariloj amasigitaj kontraŭ la pastrecaj inklinoj ! La familio malpli religiema, la lernejo senpreĝa, la soldatejo, la malfavoro al profesio plenigita je malfacilaĵoj kaj je laborado senfrukta. Kiam, laŭ konfeso de regnestraro, la normalaj lernejoj (por regnaj instruistoj) malpleniĝas tial, ke tio naskas maltrankvilaĵojn, malgraŭ ĉio estas ankoraŭ pastroj, eĉ plimultaj ! kaj la militservo ilin faris pli entreprenemaj. ! Kaj eĉ ili naskis pastrecajn inklinojn en la soldatejo !



*Kaj la religiuloj'*

Kvankam persekutitaj, juĝitaj, disigitaj, ekzilitaj; malgraŭ ĉio, ili vivadas: ili ankoraŭ havas novajn varbitojn. Plie aliaj religiulaj societoj formiĝis laŭ novaj reguloj. Nur pasos kelkaj jaroj, kaj la religiula vivo ekfloros pli fruktodona ol iam. Ĉio tio montras, ke en la katolismo estas nevenkebla:

*Alloganta forto*

Ĝia supereco, ĝia unueco, ĝia firmeco elvokas admiradon.

*Tio estas facile videbla:*

Ĝia dogmaro sole liveras la respondojn, kiujn pasie serĉas la plej eminentaj spiritoj. Ĝia moralo rilatas bezonojn de nia konscienco. La homa mizero nur en ĝi trovas plej dolĉajn konsoligojn. Fine la religio eniĝis en nian sangon. Tial en Francando

*Eklesio vivadas kaj vivados!*

Kio okazas nuntempe, tio estas nur ventego, kaj la ven-tegoj ne ĉiam daŭras. Tiu ĉi efektivigos unuiĝon pli intiman inter la katolikoj, disigos la malkonsentojn ekzistantajn de cent jaroj inter la popolo kaj la pastraro, revivigos la kredon en la direktantaj klasoj. Kiel diris la kuraĝa episkopo de Nice ni ne estas maltrankvilaj pri la fino de tiu batalado. Ni povas travivi malbonajn tagojn, eĉ pli malbonajn ol tiuj, kiuj ni konis kaj vivis, sed la morgaŭa tago estas nia; ĉar ĝi estas tago de Dio.

Tia estas la analizo de la bela libro de S-ro Abato Barbier. Malgraŭ siaj mankoj, ĝi montras evidente kion oni devas opini pri la nuntempaĵoj. Sinceraj homoj penetriĝu pri tiuj fortaj ideoj. En tiuj ĉi ili trovos, kun precizaj sciigoj pri la nunaj, neŝanceleblan kredon pri la estonto.

(El « *La Paroisse* » ; N° 93).

ESPERANTIGIS: X. (1)

---

1. — Ni estas tre dankaj al la bonega tradukisto de l'supra analizo, se li bone volus konigi sin al ni. (La Redaktoro).

## EN ESPERANTUJO

### REVUO DE LA REVUOJ ESPERANTISTAJ

**Lingvo Internacia:** (jan. 1-a). — « *Statistiko pri la jaro 1905-a* » montras la tre gravan kaj ĝojigan progresadon de Esperanto en la diversaj landoj. — En « *la X-a Internacia kongreso kontraŭ alkoholismo, en Budapeŝto* », Profesoro Kassowitz parolis pri temo « *Alkoholo kiel nutraĵo* »: « Kiu opinias, li diris, ke alkoholo varmigas, fortigas kaj refreŝigas kaj anstataŭas aliajn nutraĵojn, tiu agas kiel maŝinisto, kiu volas enŝpari duonon da karbo kaj fine konvinkiĝas, ke laborkapableco de maŝino estas nur duona ». — P-ro Aug. Forel parolis pri « *Alkoholo kaj vivo seksa* »: « *Alkoholo estas plej granda mortiganto de homaro: ĝi venenas jam en komenco la ĝermantan embrion. De gepatroj-alkoholuloj degenero estas transportata al infanoj* ». — (Januaro 15-a) S-o Marcel Finot diras en la *Konsideroj pri la monda sistemo*; « El tiuj ĉi rimarkoj, S-o Wallace konkludas la jenon la suna sistemo estas centro de amaso da sunoj, kaj ĝi estas centro de Vojo Lakta. Tiu ĉi entenas en si mem aŭ en sia apudaĵo la plej grandan multon da mondoj. Trans tio, la plej granda verŝajno estas, ke absolute nenio ekzistas. Do, la suno estas centro de la videbla Universo, kaj fine centro de tuta materia universo. Nu, S-ro Wallace pravas, ke Tero havas lokon, kondiĉojn tiel maloftajn, tiel privilegiajn, ke ili estas sendube efektivigitaj ĉe unu sola loko, kaj fine li montras ke nur sur tiu ĉi tero povis vastiĝi vivo kaj vivi homo, kaj ke tuta Universo taŭgas por ni.

Efektive, por ke la mondo estu loĝebla, estas necese: 1-e) ke ĝi estu sufiĉe proksima al suno por ke la temperaturo taŭgu por la vivo; por ke nuboj kaj pluvo povu formiĝi; 2-e) ke la atmosfero estu grandampleksa kaj sufiĉe dika; 3-e) ke ekzistu maroj, marmovoj kaj Luno por ĝin efektivebligi; 4-e) ke la oceanoj estu profundaj kaj ke la spaco da akvo estu almenaŭ dektriobla je la teraĵo; 5-e) ke ekzistu polvo, kiu formas pluvajn nubojn. » (Daŭrigota).

**Internacia scienca revuo** (Jan. 1906). *La memmortigo kaj ĝiaj kaŭzoj*. — « La motivoj, diris la P-ro E. Tarnoskij, de memmortigoj por viroj kaj virinoj estas ankaŭ diversaj. Inter

viroj estas pli multe da memmortigoj pro ekonomiaj kaŭzoj, alkoholismo, timo al kriminala aŭ societa persekuto. Entute, tiuj ĉi tri motivoj kaŭzas memmortigon ĉe 20 % aŭ 35 % da viroj kaj 12-15 % da virinoj, t. e. proksimume du aŭ trioble malplie. Sed inter virinoj okazas pli da memmortigoj pro malfeliĉa amo aŭ familia tumulto, cirkaŭ 20 %, en Italujo eĉ 60 %, Do inter viroj sammotive nur 5-10 % (en Italujo 30 %).

Psikaj kaj fizikaj malsanoj sekvigas memmortigojn preskaŭ samnombre inter viroj kaj virinoj. Ne malpli grandajn diferencojn en la motivoj de memvola morto ni trovas en diversaj grupoj (inter la junularo, nature, ĉefas la memmortigoj pro ampasio kaj familiaj kaŭzoj, inter la maljunularo unuaplane staras malsanoj kaj suferoj ĉiaspecaj), kaj en divers-profesiaj klasoj, inter vilaĝa kaj urba loĝantaro. Sed la statistikaĵoj pri tiu ĉi demando ne ekzistas, aŭ estas tro malsufiĉaj kaj dubindaj.

**Espero Pacifista** (dec. 1905). — Ĉefartikolo: *La Amerika-Brita-Franca Interkonsento*, de Andrew Carnégie (El ĵurnalo *Echo de Paris*): «Kiam la plena konsento de ambaŭ jarcente malamikoj estis anoncata al la mondo, ĉiuj saĝaj homoj ĝoje akceptis la novaĵon.

La Egipta demando estis certe la plej grava malpacigilo; Francujo konsentis lasi Anglujon regi Egiptujon, kaj kompanse Anglujo aprobis la francan agadon en Maroko.

Sume, ambaŭ kontraŭaj nacioj liberiĝintaj el la premo de l'malbonaj sonĝoj kaj de la malamikeco, konstatis ke sia profito estos sin estimi reciproke kaj vivi kiel bonaj najbaroj. Feliĉa fino de tiom da malamikajoj malutilaj por la sorto de du famegaj landoj, kies roloj estis tiel grandaj en la estinteco, kaj kiuj kunigas de nun la plej kuraĝigantajn esperojn por sia propra feliĉo kaj tiu de la homaro.

Unuigitaj Ŝtatoj, filoj de Anglujo kaj baptofiloj de Francujo, estas alligitaj al tiuj ambaŭ landoj per streĉitaj ligoj. Ĉu necese estas rediri, ke la interkonsento, kiu unuigis Francujon kaj Anglujon, multege interesis la amerikan respublikon? Neniu ekonomiisto, neniu politikisto ekzistas, kiu pri ĝi ne pripensis longe.

Ni povas neniel akcepti la eblecon de milito inter ameriko kaj Francujo. La animoj de Washington kaj Lafayette, riproĉus al

ni tian entreprenon, kiel krimon. Kio ajn okazos, ĉiu malpaceto — se tia stariĝos inter ni, — estos pace forigata.

Ĵus pligrandigis ankoraŭ nia simpatio al Francujo, kiam ni konstatis ke ĝi decidas agi, kiel la fratrespubliko, pri Eklezio. Apartigante religion de l' regno sciigante, ke ĝi estas amiko kaj protektanto de ĉiuj religioj, kaj malamiko de ĉenia, Francujo alproksimiĝas al amerika koro ». (1)

« La Duelo », el Sam. Meyer: « La kontraŭduelaj ligoj tamen ne postulas, ke iliaj aliĝantoj promesu neniam dueli — tio eble estus postuli tro multe, ĝis la juĝantaroj pri honoraj disputoj plene funkciados — ili nur petas, ke oni batalu kontraŭ antaŭjuĝo kaj subskribu jenan aŭ alian tiaspecan deklaron

« La subskribinto promesas labori laŭ sia povo, tiel en siaj societaj rilatoj kiel en sia publika vivo, por divastigi la movadon, kies fina celo estas la tuta malapero de la duelo.

« Li opinias neŝatinda antaŭjuĝo la epiteton malkuraĝulo, donatan al kiu ajn ne volas dueli li rigardas kiel honorindulon kaj alte estimas la homon kiu, pro serioza konvinko, rifuzas duelon.

« Li kredas necesega la kreadon de veraj juĝantaroj pri honoraj disputoj. La decidoj de tiuj juĝantaroj liverus realan kompenson al la maljuste ofendito; tiu ĉi do ne estus plu tentata ĝin serĉi mem, laŭ necerta maniero, per armiloj. »

Tuŝante Francujon, ni scias ke ligo, ankoraŭ ne sufiĉe konata, fondiĝis antaŭ kelkaj jaroj. La sekretario estas Grafo J. du Bourg, château de Mondoville (Hte Garonne) (France). Nenia kotizaĵo estas postulata de la aliĝantoj.

**Juna Esprantisto** (Jan.-Febr.) — estas nun presita de *Pres. Esp. Soc.* en Parizo. La formato estas pligrandigita kaj la revuo estas 16-paĝa. *Esperanto inter Junularo* (de Ed. Privat); skizo de la progresado dum jaro 1905. Jen la konkludo: « Fine mi petas ke oni bonvolu helpi nin en la redaktado de tiu kroniko, sciigante nin pri ĉiu nova kurso aŭ alia progresfakto por Esperanto inter Junularo. Al ĉiuj, kiuj laboradas por tiu celo, nia revuo estos larĝe malfermata por anonci ĉiujn novaĵojn, espreble ĉiam antaŭpaŝojn. »

---

(1). Bedaŭrinde la disigo en Franclando, anstataŭ doni liberecon malŝatinde subpremas religion kaj estas la neo de konscienca libereco. (Noto de la Redakcio de E. K.)

**Tra la Mondo** (Jan.) El la parolado de S-o af Wirsen, okaze de la disdono de l'premioj de Nobel en Stokholmo: « Kie ajn la literaturo de nacioj vivas ankoraŭ riĉan kaj ne exploreblan vivon, tie ankoraŭ estas garantiita la ekzistado de tiu nacio, ĉar la floro de l'kulturo ne povas elkreski sen tero por ĝermi; sed en ĉiu nacio troviĝas iaj malfortaj geniuloj, en kiuj la Genio de la nacio kunigis siajn povojn. Ili staras antaŭ la mondo kiel la reprezentantoj de la spirito nacia. Ili flegas la memoraĵojn de la nacio el paŝintaj tagoj, sed por fortigi ĝian esperon je l'estonteco. Ilia poeta verkado enŝovas fortajn radikojn en la pasintaĵojn, kiel la grandega kverko de Baŭblis en la sovaĝan teron de Litvuj; sed la arbkrono murmuras en la vento de l'tago. Tia reprezentanto de la Literaturo kaj kulturo spirita de nacio estas tiu viro, kiun la Sveda Akademio en tiu-ĉi jaro distingis per la premio de Nobel. Li ĉeestas en nia rondo, kaj lia nomo estas Henryk Sienkiewicz. »

Sekvis parolado raportanta pri liaj verkoj: « Pan Wolodyowki kaj Basia », « La globo » kaj « Quo vadis ? »

Post tio D<sup>ro</sup> af Wirsen finis per la vortoj sekvantaj:

« La Literatura produktado de Sienkiewicz ankoraŭ neniel ĉesis. Li nun estas okupata je la publikigado de granda trilogio kun ŝtofo el la tempo de Sobieski kaj nomata « Sur la kampo de la gloro. »

« Sur la kampo de la gloro » antaŭeniris lia poeta vojo mem. De sia nacio li ricevis karajn pruvojn de amo, tiom pli valorajn, ke en sia flama amo al la patrujo, li neniam flatis la nacion. Kiam li festis sian 25-jaran jubileon verkistan, oni aĉetis kaj donacis al li, per granda ennacia monkolokto, la ĉevaliran bienon, kiu estis dekomence lia gepatra hejmo; deputataro vizitis lin; li ricevis adresskribaĵojn, kaj festa prezentado estis farata je lia honoro en la teatro de Varsovio. Al tiuj esprimoj de admiro estas aldonita nun honoraĵo de la alta nordo, kiam la Sveda Akademio decidis transdoni la Nobel-premion literaturan de la jaro 1905 al Henryk Sienkiewicz. »

Ni tre konsilas al niaj legantoj abonon al tiu interesa kaj bela revuo. Por ke ili povu juĝi ke niaj laŭdoj ne estas troaj, la administracio sendos *senpagan* specimenon al tiuj, kiuj ĝin petos per poŝtkarto, sciigante ke ili legas « Espero katolika » (1).

(1) Vidu adreson en anonco.

**L'Esperantiste** (Jan: ). — Pri « Neŭtraleco kaj tole-remo », bonege parolas S-o de Beaufront :

« Tiu neŭtraleco, gardilo de nia individua libereco, havas kiel sekvon rektan kaj praktikan unu aferon kiun ni ne devas forgesi, la toleremon, plenan, absolutan, toleremon tiel plenan, tiel absolutan, kiel nia neŭtraleco mem. Ĉar estas konsentite, ke l'Esperantismo estas malfermata por ĉiuj opinioj, por ĉiuj partioj, por ĉiuj religioj — kaj kiel lingvo povus esti malfermata por ili ? — sekve estas konsentite, ke en niaj societoj, en niaj grupoj renkontiĝos homoj plej diferencaj pri opinioj kaj kredoj ; estas ankaŭ konsentite, ke ĉar ĉiuj havas la saman rajton por esti ĉe ili, ĉiuj devas havi unu por alia saman respekton kaj saman toleremon. Tial neniam politiko nek religio devas esti aludataj en la konsidoj de niaj grupoj, ĉe kiun oni venas nur por helpi unu alian en la batalado, por formi faskon pli kunligitan, pli densan, en celo venki pli bone kaj ne en celo disiĝi por esti venkita. »

De nun L'Espérantiste donas nur france la kronikon pri francaj grupoj. Ni iom bedaŭras tion, tial ke la eksterfranculoj tre ŝatis legi la progresadon de Esperanto en Francujo — « Historio de Esperanto » daŭras aperi kaj tre utilos por forigi kelkajn legendojn jam ekaperintajn.

**Belga Sonorilo** (Jan.), — Interesege demando de D-o L. Seynaeve pri « Centra Oficejo aŭ Centra komitato ».

Atakas artikolon de S-o Bourlet aperinta en « Esperanto-Jurnalo » de decembro 31-a. « Laŭ S-ro generalo Sebert, la Centra Oficejo estas nur utila informejo ; laŭ S-o Bourlet, ĝi volas esti ĉiopova superreganta Centra Komitato. Kiun do oni trompas ĉi tie ? aŭ plibone : Kiu do trompas nin ? » . — La respondo troviĝos en venonta numero.

**The Brihtis Esperantist** (Jan.), — Estas nun unuigita kun « The Esperantist » de S-o Mudie. El « La transcendaĵoj de Esperanto » de S-o Ellis (Keighley) :

« Kiu aŭdis la noblan paroladon de D-ro Zamenhof ĉe la Bulonia kongreso, tiu ne povas dubi, ke Esperanto pli altigos lian moralan vivon. Tie nia Majstro staris, kiel patriarko benanta la genton. Kiel dua Moizo, liberiginte la popolon,



kondukinte ĝin trans la maron kaj tra la dezerto, venkinte ĉiajn malfacilaĵojn, kun la promesita lando antaŭ liaj okuloj, li laŭdegis Misteran Fortegon regantan la mondon, kaj petegis Lian helpon kaj protekton kaj Lian benadon por la tago de ellibereco. Studu la himnon de D-ro Zamenhof deklamitan ĉe la kongreso, tenu ĝin en via koro, uzu kaj utiligu ĝiajn principojn en via vivo, kaj nepre vi fariĝos pli bona homo. De tiuj mirindaj tagoj kongresaj, — mi ne volas trodiri, sed mi kuraĝas konstati, — Esperanto fariĝis ĉe multaj, sanktaĵo — jes, eĉ pli, preskaŭ religio. »

**Germana-Esperansisto** (jan). — Rakontas la progresojn de *l'Pasinta Jaro*, — Kronikas la novaĵojn el la « Germanaj grupoj », kaj el la « Gazetaro » germana. — Rekomendas la « Albumon de konataj Esperantistoj », kiun preparas S-o Fritz Schuck, BRAUNSCHWEIG, Thomaestrasse 16 (Germanujo). — El tiu Albumo, G.E. donas la portretojn de S-oj de Beaufront, Cart, E. Boirac, Ch. Méray, O'Connor (Rajtigito angla de E. K.), D. Uitterdijk.

**Ruslanda-Esperantisto** (jan.) Belega revuo sur granda formato, kun 24 paĝoj. — Artikolo kurioza pri « Dogmoj de Hilelismo » (laŭ la nomo de Hillel, antikva Palestina saĝulo, kies modifikita principo estas akceptita kiel bazo por la religio (?) de la Hilelistoj). — Ni reparolos detale pri tiu *nova religio*. — « Pri Rusa revolucio kelkaj vortoj », de Leo Belmont. — El nia kunlaboranto, G. Kolovrat : « Esperanto en Parizo ».

**La Suno-Hispana** (jan). — Bona kroniko de la movado Esperantista. — Kiel Aldono literatura : « Kuracisto per Batoj », komedio de L. F. Moratin, esperantigita de Vicente INGLADA. En formato de libreto, kiun oni povos bindigi. — Sur la unua paĝo, belega portreto de la senlaca pioniro, Inĝeniero Ricardo CODORNIU, Prezidanto de Hispana S. P. P. E.

**Holanda Pioniro** (dec.). — « Fina numero de nia gazeto. Komenco de pli forta vivo », diras la fervora Direktoro, S-o D. Uitterdijk. — Mortas « Holanda, Pioniro », malgraŭ la penadoj de ĝia lerta gvidisto, sed samtempe naskiĝas « Holanda societo p. p. Esperanto ». — Tiun bedaŭrindan morton devas

mediti la gazetoj naciaj, kiuj volas fariĝi « internaciaj »... Gazeto *nacia* devas instrui la naciaĵojn pri Esperanto kaj ĝin lernigi, ĉu ne vere? — Ni estas certaj, ke en estonto renaskiĝos ia « Holanda Pioniro », kiel organo *nacia* de la Societo nacia. S-o Uitterdijk ne vane dissemadis. Li esperu kaj paciencu.

**Esperanto** (jan). — Eldonita en Budapesto, de S-o. A. Marich, ilustrita. — Fabelo pri la acero. (A. Altenburger). — El feliĉa vojaĝo, de N. P. Evstifeieff, nia malnova aboninto. — La Sunforto, trad. Boriso Kotzin.

**Antauen Esperantistoj!** (dec.). — Skizo pri Nova Kaledonio, de S-o Bardoulet « Tiu bela lando, kun siaj naturaj riĉecoj, terkulturaj kaj minaj povas facile esti kolonizata per Eŭropanoj, sen danĝero por ilia sano.

« Kvankam kelkaj lokoj posedas lagojn, precipe sur la okcidenta bordo, paludaj febroj ne ekzistas kaj Eŭropano povas terkulturi sen timo de la epidemiaj malsanoj, kiuj estas ofte danĝeraj por li en la aliaj varmaj landoj. La aŭtoro de tiu ĉi artikoleto, kiu loĝadis daŭm 21 jaroj en Nova Kaledonio, neniam havis malsanon gravan. Suno, kiu estas en aliaj tropikaj landoj, la malamikon kontraŭ kiu oni devas senĉese prizorgi, estas malfacile danĝera se oni prenas la plej elementajn singardojn. »

Kronikas la progresojn de Esperanto en la du Amerikoj.

**Alĝeria stelo** (jan. 5-a). — Aperas nun kun beleta kovrilo verda kaj sur ok paĝoj. — « En Rusujo per Esperanto », interesa rakonto reala. — « La Morto de Martino la Paŝtisto », de Don B. Ricci, esperantigis A. Gallois.

**Esperanto-Ĵurnalo** (jan. 14-a). — « Tra la Pariza Esperantistaro », de Th. Rousseau. Rakontas viziton al la diversaj « Esperantistoj » en Parizo « Legante ian verdan libron dum mia tagmeza manĝo en ia restoracio, oni vokas min : « Bonan tagon ! Kiom da tempo de tiam, kiam mi vidis vin ! » Estas unu el miaj malnovaj amikoj, kiun mi ne vidis de kvin jaroj, kiu ekparolas al mi en Esperanto. Tuj, interdemandoj pri nia farto, pri niaj aferoj ; kaj sinjoro, sidanta kontraŭ mi diras al sia najbarino : « Ili parolas Esperanton, la novan lingvon, vi

scias... ». — Dum la tuta sekvinta posttagmezo mia amiko kaj mi promenis babilante nur Esperante.

« Diru, nune, ke Esperantistojn oni renkontas nur kunvene. »

**Esperantisten** (jan.). — Saluton al tiu nova sveda kunfrato, redaktita de la fama Esperantisto P. Ahlberg, en Stokholm. Ok-paĝa gazeto en granda formato. — « Nia celo kaj nia programo ». — Esperanto en Nordo, de P. Ahlberg, liveras novaĵojn neeldonitajn. — « Estu benata », Hinda legendo de H. Sienkievicz, (el la *Kondukanto* de A. Grabowski).

**Centrameriko esperantista** (jan. feb. mart.). — Novanaskito, al kiu ni sendas korajn bondezirojn: Redaktoro: G. Abrill, 8-a, Avenida Sur, 11. Canton Libertad, Guatemala. — Plena Raporto pri la kongreso Esperantista (nur Hispane). — Bedaŭrinde, multaj eraroj en la teksto Esperanta de l'unua paĝo. — Kredeble la presisto ne ankoraŭ kutimas presi Esperanton!

**Lorena esperantista Ĵurnalo** (jan. kaj feb.). — Anoncas la kursojn de D-ro Noel, de S-o Borizon; kaj konferencon de P-o Thiaucourt. — En koncerto, oni kantis partojn el la « Ĥoroj de Esther », esperantigitaj (se ni ne eraras) de la lerta kaj fama tradukinto de « *Rolandkanto* (D-o Noel).

**La Revue de l'Esperanto** (feb.), el Boulogne, fariĝas aparta gazeto, sub la direktado de l'eminenta Profesoro Michaux, la simpatia organizinto de l'Kongreso. Enhavas leteron de S-o Michaux kiu respondas la demandojn de D-ro Seynaeve.

## NOTETOJ

**Tra la mondo**, en ĝia marta numero publikigis kuriözan paĝon. Ĝi donas la portretojn de Pastro protestanta Sneeberger, de Kolonelo Pollen, framasano, kaj de la Direktoro de E. K. Sub la portretoj troviĝas artikoloj de la tri diversreligiaj Esperantistoj. — Pruvo tre taŭga de la neŭtraleco de Esperanto.

**Esperantaj Ŝlosiloj**. Ĵus aperis eldonoj sveda kaj hispana. Tiuj libretoj estas la plej praktikaj propagandiloj. (Vidu anoncon).

**Il crociato**. Itala ĵurnalo katolika publikigata en Udine, eldonis nian *Leteron publikan al ĉiuj pastroj*, dank'al la fervora agado de Pastro Jakobo Bianchini.

**The Crank**, angla revuo, dŭarigas eldoni artikolojn de Profesoro P. D. Hugon.

**Propagando en Komercistaro.** La Klubo Esperantista Reims, a (sidejo sociala : Place Amélie Doublé, en Reims-Francujo), en la celo disvastigi Esperanton en la komercistaron, petas Srojn komercistojn kaj industriistojn el ĉiuj landoj bonvoli sendi al ĝi kelkajn ekzemplerojn de siaj cirkuleroj, avizoj, prezaroj, k. t. p.. Esperante redaktataj. Tiuj dokumentoj estas komunikotaj al la komercistoj de l'urbo Reims (108.000 loĝantoj). La klubo Reims'a pensas ke tiu komunikigo estos, samtempe, tre utila al la sendintaj komercistoj.

Sin turni, ĉu al la sidejo sociala. supre nomata, ĉu al S-o F. o Marot, Prez de l'klubo, rue Ponsardin, Reims (Marne), Francujo.

**Preĝaro por katolikoj.** Venis novaj subskribantoj, sed ne sufiĉe multaj. Iru Tuj Hodiaŭ ĉe via librovendisto, kaj diru al li ke vi aĉetos la *Preĝaron*. Li tuj skribos al ni por peti almenaŭ dek ekzemplerojn, kaj la *Preĝaro* tuj presiĝos!

## BIBLIOGRAFIO

**Proverbaro esperanta**, aldono al la verko *Fraseologio rusa-pola-franca-germana* de M. F. Zamenhof. Kajero 1-a : kvarlingva kajero 1 fr. 25. La esperanta: 50 centimojn, ĉe l'aŭtoro, strato Nowolipki, 43, Varsovio.

**Akademi internasional de lingu universal** (okt'. — Cirkulero, kiu enhavas preskaŭ 450 radikvortojn de *propraj nomoj* Nemalŝatinda laboro por Esperantistoj.

**Instruado de esperanto per bildaro**, de Th. Cart. 30 centimojn afrankite. Tiuj tri novaj lernolibroj de nia senlaca Profesoro multege helpados la lernadon de Esperanto. La *Notions* estas uzeblaj antaŭ « Esperanto en dek lecionoj », de l'sama aŭtoro. La alia verketo estas bonega por interparoladaĵ ekzercoj en la Kursoj esperantistaj.

**Grand dictionnaire français esperanto.** Unua kajero aperis, 16-paĝa. Plej interesa kaj havinda. Tiuj, kiuj subskribos nun pagos nur 17 frankojn.

**Ĉielo kaj Tero.** Mistero de Lord Byron. Esperantigis Doktoro NOEL. Jen la dua eldono de tiu plej leginda verko, 54-paĝa

sur granda formato. Belege presita, ĝi estas unu el la plej ĉarmaj poeziaĵoj, kiujn mi legis en Esperanto. Jen komenco de la preĝo de Anjo :

Serafo ! Min aŭdu de l'supra sidejo ! . . .  
 Tra spacoj senlimaj . . . memoru virinon  
 De kiu vi estas amata ! Ŝi estas  
 Nenio kompare kun via grandeco !  
 Sed kredu, ke por ŝi, vi estas nun ĉio !  
 Ne scias vi la maldolĉecon de larmoj !  
 Mi sola ĝin konu ! Vi estas senmorta.  
 Ĉiela beleco de viaj radiaj  
 Okuloj neniam pereos ! vi povas  
 Samideaniĝi kun mi nur per l'Amo !

Tuj mendu la libron ĉe via librovendisto (1).

**Esperanto Radikaro**, de Th. Cart. — Tre oportuna libreto, kiu konsistas 1° el ĉiuj radikoj — escepte la afiksoj — entenitaj en *Universala vortaro* ; 2° el ĉiuj radikoj, samaj kaj komunaj, entenitaj en la franca, germana kaj angla vortaroj ; 3° el multaj radikoj, kiuj troviĝas kune nur en la germana, sveda kaj hispana vortaroj.

Eĉ se kelkaj el tiuj ĉi radikoj ne plaĉas, oni povas konsideri ilin akceptindaj aŭ akcepteblaj.

Tiu ĉi libreto estos tre utila : al profesoroj, por tuj koni la ortografion de vorto ; al lernantoj, por noti la radikojn, kiujn ili ne ankoraŭ konas kaj ilin parkere lerni. La radikoj estas ordigitaj de kope tio faciligas la taskon. — Eldono de *Presa Esperantista Societo*.

**Bolesĉjo**. — Rakonto de Maksim Gorĵkij. Traduko de Ivan Seleznjov. Presejo de Wejsbrut, S. Peterburgo. Ok-paĝa broŝureto, tre bele presita. Aĉetebla ĉe S-o Espero, S. Peterburgo.

**Oficiala Protokolaro de la Unua Kongreso Universala de Esperanto**. Prezo 30 centimoj. Havinda por ĉiuj Esperantistoj. Enhavas la nomaron de la membroj de l'Lingva Komitato, bedaŭrinde sen adresoj plenaj.

---

(1) Aŭ ĉe la Direktoro de E. K.

**Lasta Parolado** pri la lingvo Internacia Helpa Esperanto, originale verkita de S-o Thiaucourt, el la Nancy'a Universitato. Belega broŝureto, kies teksto aperis jam en *Int. Scienca Revuo*. Enhavas multajn kaj ŝatindajn dokumentojn por propaganda parolado, (Paris, Hachette). — Prezo ne montrita sur la broŝuro).

### ALIAJ LIBROJ RICEVITAJ

Analizotaj en venonta numero :

**Poŝlibro Internacia**, por aferistoj, turistoj, k. c., de Gerorgo-Norman. Paris-Hachette. — 2 fr.

**La interrompita Kanto**, de Eliza Orzeszko, tradukis el Pola lingvo KABE, — Paris, Hachette. — 75 centimojn,

**Pola Antologio**, elektis kaj tradukis KABE ; kun antaŭparolo de P-o Th. Cart. — Paris, Hachette. — 2 fr.

**Verkaro**, de V. N. DEVJATNIN. Libro unua. — Paris, Hachette. — 2 fr.

### ABONMONOJ RICEVITAJ

#### PLENAN ABONMONON NI RICEVIS

*En Franclando* (4 fr.) de E. Gilles, Boulogne-s-Mer. — De Labilherie, Marseille. — Orgebelin, Nantes, — L. Rigoir, Charenton, — A. Stribick, Paris. — Fr. Bernard Louis, Besançon. — Gén, Sebert, Paris. — De Rey-Pailhade, Béziers. — Buret, Sainville, — Devoucoux, Alfortville. — Seignémorte, Flamérans. — Soisson, Sens. — Vignerón, Givet. — Poirón, Nantes. — Gouraud, Nantes. — Am. Michel, Grenoble. — J. Jeanneney, Gérardmer. — Ab. Retz, Héricourt. — Dr. Offner, Grenoble. —

*Ekster Francl.* (5 fr.) de : E. Meier, Brieffach (Germ.) 10 fr. j por du abon. — Ch. Zacherl, Passaŭ (Germ.) — Honinck, Parok. de Laplante, Namur (Belg.), ankoraŭ ŝuldata 1 fr. — Mybs, Altona (Germ.) — Grupo Esperantista, Valencia (Hisp.), ankoraŭ ŝuldata : 2 fr. — Em. Marconell, Ieruel (Hisp.), ankoraŭ ŝuldata : 2 fr. — Santiago Garcia Oltra, Valence. (Hisp.) ankoraŭ ŝuldata 2 fr. — Esperantista Klubo, Prague (Boh. Autr.), ankoraŭ ŝuldata 2 fr. 50. — Ric. Codorniu, Murcia (Hisp.),



10 fr. por du abon. — J. Ellis, Keighley (Angl.), — C. Jean-  
neney, Strasbourg (Germ.) — F. Woods, Formby. (Angl.) — A.  
Thill, Plymouth (Angl.) — Josefo Gorenszach, Cappellano.  
(Ital.) ankoraŭ ŝuldata 1 fr. — Em. Navarro, Murcia (Hispanj),  
ankoraŭ ŝuldata : 2 fr.

► Niaj abonantoj estas petataj sendi l'abonmonon al la Raj-  
tigitoj de sia lando ; aŭ se ne ekzistas Rajtigito, rekte al la Di-  
rektoro de E. K.

## MONOFEROJ POR ESPERO KATOLIKA

KVARA NOMARO : S-o. — Codorniu (Murcia), 7 fr, 50. —  
Ab. L. Requin (Draguignan), 5 fr. S-o Frécot (Nancy), 8 fr. —  
Ab. Géan (le Vézinet), 1 fr. — Dr Savy (Valensolles), 1 fr. —  
El Gallard (Angers), 1 fr. — L. E. Meier (Brieffach), 1 fr. —  
J. Ellis (Keighley), 12 fr. — Sumo : 36 fr, 50.

Antaŭaj donacoj : 393 fr. 50 + 36 fr. 50 = 430 fr. 00

Restanta ŝuldo : 700 fr. 00 — 430 fr. 00 = 270 fr. 00

Al ĉiuj donacintoj : plej sinceran dankon. La bedaŭrinda  
ŝuldo ankoraŭ ne tuĝe malaperis... Em. PELTIER.

## PENSOJ

Ĉiam aŭskulti, ĉiam pensi, ĉiam lerni : jen per kio ni vivas.  
Tiu, kiu nenion plu deziras, nenion lernas, ne estas inda vivi.

\*  
\* \*

Pacienco, fratino de l'espero, efika balzamo saniga de l'animo  
pacienco, kiu ĉerpas en l'inercio mirindan kaj bonfaran forton ;  
— ĉu malsanulo ekzistas, kiu ne benus cian dolĉan magion !  
ĉu kuracisto ia povus nekoni, ke la febraj krizegoj malperas  
antaŭ ci, ke ili duobligas kiam ci foriras, ke ci helpas por  
kvietigi la plej fortegajn dolorojn kaj ke ci akcelas la plej  
malfacilajn resaniĝojn ? Sola ci estas forta en la malfortulo ;  
sola, ci estas la plej perfekta kaj plej delikata rivelado (1) de  
l'animo homa, laŭ tio, ke ĝi estas kapabla forigi de l'korpo la  
malsanojn.

(El « *Hygiène de l'âme* » de Barono de Feuchstersleben.)

1. Riveli (france, *révéler*; — angle. *reveal*; — latine, *revelare*), ŝajnas  
pli taŭgaol *malkovri*, aŭ *konigi*.

## ŜAKOJ

SUB LA REDAKCIO DE S-O J. ELLIS EN KEIGHLEY (ANGLUJO)


La legantoj de E. K., kiuj ŝatas la ŝakludadon, estas petataj konigi al ni se ili deziras: 1<sup>o</sup>, ke ni publikigu *ludojn*, kaj ne nur problemojn; 2<sup>o</sup>, ke ni daŭrigu la lecionojn pri ŝakludado.

## STEINITZ'A ALLOGAĴO

BLANKO	NIGRO
Steinitz	Diversaj
1 S. 4 R.	1 S. 4R
2 Ĉ. 3 KD.	2 Ĉ. 3KD.
3 S. 4 K.	3 S×S.
4 S. 4 D.	4 D. 5T ŝak.
5 R. 2 R.	5 S. 4D.
6 S. ×S.	6 K. 5 Ĉ ŝak.
7 Ĉ. 3 K.	7 o-o-o.
8 S. ×Ĉ.	8 K. 4KD.
9 S. ×S ŝak.	9 R. 1Ĉ.
10 Ĉ. 5ĈD,	10 Ĉ. 3K.
11 K. 3 D.	11 D. 4T.
12 R. 3 K.	12 S. 3TD.
13 R. 3 Ĉ.	13 S×Ĉ,
14 S. 3 K.	14 T×S!
15 S×T.	15 D. 4D ŝak.
16 R. 2K.	16 K. 4K ŝak.
17 R. 2D.	17 K. 5Ĉ ŝak.
18 R. 2R.	18 Ĉ. 5Ĉ.

Forlasas

PROBLEMO 3-a  
NIGRO 8 PECOJ.



BLANKO: 7 PECOJ  
B. Komencas kaj mortigas per la 2-a iro.

Solvo de Problemo 3-a (S-ino Bairn): 1-a iro de Bestas: Ĉ. 7ĈR.

Se N 1 S×Ĉ      2 D.4D mortigas.

Se 1. T×Ĉ      2 same.

Se 1 S×T      2 Ĉ.5TR×

Se 1 P.4KR      2 Ĉ(7ĉ)×S×

Se 1 P.4R      2 D.1KR×

Se 1 T.5T      2 T×T ×

Ĝuste solvis D-ro Martial Savy (Valensole).

SENDU LA SOLVOJN *rekte* ALLA DIREKTORO DE E. K.

ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRÉTIENNE (*Analoj de Filozofio Kristana*) — Direktoro Pastro Laberthonnières Administracio Librejo Bloud, 4, rue Madame, Paris; abono jara 20 fr. — 100 paĝoj monate. — La plej internacia, plej serioza, plej progresema revuo filozofia!

REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (*Revuo de Franca Pastraro*). — Redaktoro Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio: Librejo Letouzey et Ané, 76 bis, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono 23 fr. (En Franc. 20 fr.) 110 paĝoj monate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj.

REVUE PRATIQUE D'APOLOGÉTIQUE (*Revuo de praktika apologiado*), sub la direkcio de P.-oj Baudrillard, Guibert kaj Lesêtre. Duonmonata revuo, 40 paĝa. Jarabono 12 fr. (En Franc. 10 fr.) Administracio Librejo Beauchêsne kaj K-o, 117, rue de Rennes, Paris.

ESPERANTA LIGILO, monata revuo en reliefpunktoj por Blinduloj. Jare 3 fr. por ĉiu lando. Direktoro Prof. Th. Cart 12, rue Soufflot, Paris. — Januaro 1906. Enhavo Kroniko (Th. C.) — Problemo. — Poezio Birdetoj (Fr. Coppée). — Humoraĵo Pruvo, Decido. — Miksaĵo: proverboj (F. Zamenhof) — Felietono: Parolado de D<sup>ro</sup> Zamenhof en Boulogne-sur-Mer.

ESPERANTAJ ŜLOSILOJ, de ĈEFEC, 45, Christchurch Road, Streatham Hill, London, S. W. — Estas nun aĉeteblaj la angla, germana, franca, itala, hispana, rusa, kaj sveda eldono, kaj riceveblaj po 3 fr. 50 la centon (100). Ĉiulandaj poŝtsignoj estas laŭ efektiva valoro akceptataj. — Je la sama adreso POŜTKARTOJ kun teksto kaj adreso de diversaj naciaj societoj esper. — Po 1 fr. 35 la centon (100).

LE COLLECTIONNEUR, revue mensuelle, carto-philaté-



lique et littéraire. — Direktoroj C. GUINOT, 38, rue de Chalon, au Creuzot; Paul LEPERS, à Wattrelas (Nord), Francujo. Jarabono 2 fr (en Franc. 1 fr. 50). 16 paĝa, kaj 8 paĝa kovrilo.



« TRA LA MONDO » (*Tutmonda multilustrata revuo esperanta*). — Nuntempaĵoj; arto, literaturo, sciencoj; komerco, industrio; militistaro, maristaro; teatro; sportoj; virina kaj gejunula paĝo; felietoĝo; ludoj, konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Jare 8 fr. kvaronjare: 2 fr. 25. — Turnu vin 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la Direktoro de E. K.

Abono sen pluaj elspezoj en francaj poŝtosficejoj.

LINGVO INTERNACIA ESTAS NUN DUONMONATA. — Envasas 32 paĝojn. Sen literatura aldono: 5 fr. — kun literatura aldono: 7 fr. 50. Adreso nova: Presejo Esperantista, 33, rue Lacépède, Paris, 5<sup>e</sup>.

ESPERO PACIFISTA, MONATA ORGANO DE LA SOCIETO POR LA PACO, abono 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.

S-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

RONDIRANTA MANUSKRIPTO, ĉiumonata, nur inter pastroj katolikaj el ĉiuj landoj Eŭropaj. Partopreno senpaga. Oni povas skribi pri ĉiaj aferoj, precipe religiaj, kaj korektas reciproke la tekstojn. Tio tre utilas por plibonigi stilon esp., ellabori terminaron teologian, kc.; estas tre agrabla. Sin turni al SERVAIS P-ro, Kat., ĉe Basilides, pl. Leopold, 7, NAMUR, Belgujo.

➤ LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura. — BELGUJO: 1 frank. — Unuiĝo poŝta 1 fr. 50 — Direktoro Fondatoro: XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝo de Bel-Artoj, membro de komitato de Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

KOLEKTISTOJ S-o, VARJU Endre, Budapest, IV, Kygio U-E 62, em, 14, kolektas k. interŝang. uzitajn poŝtm.

LONDONO; PENSIO por gesinjoroj, Moderaj prezoj. Oni parolas k. korespondas Esperante, Angle kaj France. — S-ino O'Connor, Esperanto House; 17, St-Stephen's Square; London-Bayswater.

HO, MIA KOR: Kanto Esperantista. Poezio de D-ro Zamenhof. Muziko de S-ino Josée GUIVY. — Plej ŝatinda muzikaĵo, kantita en Boulogne, dum la Kongreso. Aĉetebla ĉe la Presa Esperantista Societo, kaj ĉe la Direktoro de E. K. — Prezo: 1 fr.